

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530, U.S.A.
Telephone: [415] 653-0998. Editor: William R. Harmon. Includes promotional section in English and
informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 14, No. 3 - May-June 1978



LA ESPERANTISTA FAMILIO NEVAN ENMIGRAS USONON

Post longa luktado kun registaraj ruĝrubandaĵoj, la familio Nevan sukcesis enmigri Usonon en ĉi tiu junio.

Mikulas Nevan, konata al multaj Esperantistoj kiel la antaŭa Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, kaj poste laboranto en la Centra Oficejo de UEA, alvenos en Usono kun sia edzino Jaroslava kaj filino Nicole (denaska Esperantisto!). Usonaj Esperantistoj kiuj partoprenis la Universalan Kongreson en Portland en 1972 bone memoros la familion Nevan.

S-ro Nevan laboros en la Centra Oficejo de ELNA kelkajn monatojn laŭ antaŭa interkonsentiĝo, kaj redaktos la *ELNA Newsletter* krom ankaŭ entrepreni kelkajn gravajn projektojn por ELNA, i.a., novan librokatalogon.

S-ro Nevan ĉeestos la ELNA-kongreson en Milwaukee en julio, kaj revidos multajn konatojn tie. La fina loĝloko de la familio Nevan estas ankoraŭ nedecidite, tamen laŭraporte ili loĝos en la pacifika marborda regiono.

NI BONVENIGAS LA NOVAJN USONAJN ESPERANTISTOJN!

JOINT ELNA-KEA CONGRESS AT MILWAUKEE

Among those already registered for the 26th annual congress of the Esperanto League for North America to be held jointly with the Canadian Esperanto Association this year are a number of members of the Canadian Association and one Esperanto-speaker from New Zealand.

It is anticipated that over 100 will attend this congress. Those who intend to register are urged to send their registration forms in early to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito, CA 94530 in order to be assured rooms at the congress site, the University of Wisconsin at Milwaukee.

Excursions during the congress are being planned by the Local Congress Committee, chaired by Dr. Pierre Ullman of the University of Wisconsin. Information on excursions will be sent by the local committee directly to all registrants about a month before the congress opens.

The Esperanto Society of Chicago is planning a post-Congress in Chicago for those who do not intend to go on to the Universal Congress of Esperanto in Varna, Bulgaria. According to information supplied by Robert Runser, president of the Chicago society, a reception is planned for Tuesday evening, July 25, in downtown Chicago; followed by a trip Wednesday morning to the Polish Museum, where an exposition on Esperanto is on display. The dedication of a large portrait of Dr. Zamenhof, the creator of the international language, painted by artist J. Eisele, will take place at the museum that morning. City Councilman Roman Pucinski, former Member of Congress and friend of Esperanto, will make an address on the occasion.

The Chicago post-Congress will cost only \$10.00, and will include a bus tour of Chicago Wednesday afternoon.

Reservations for this event should be sent to: Robert Runser, president, Esperanto Society of Chicago, Box 11958, Chicago IL 60611. Early reservations are urged.

Inexpensive lodging in Chicago has been located by the Chicago Esperanto Society for those who wish to stay a day or two in Chicago after the ELNA Congress and before leaving for the Universal Congress in Varna. Rates are reported to be \$15.00 single. For more information, write the Chicago society at the address above.

ESPERANTO IN THE PRESS

A lengthy and favorable article on Esperanto appeared in the May 11, 1978 issue of *The Washington Post*, one of the nation's outstanding newspapers.

The article featured statements of Dr. James Lieberman, John Dale, Lewis H. Maury (88) and David Shaw (17). Maury and Shaw were referred to as the "bookends" of the age spectrum among Washington area Esperanto-speakers. A four-column photograph of Dr. Solzbacher, Thomas Goldman and Sergio Docal of the Esperanto Society of Washington accompanied the article.

LETTER FROM MRS. PEARL G. PEI

In the March-April issue of *ELNA Newsletter* appeared an obituary of Dr. Mario Pei, famous linguist and educator and supporter of the international language Esperanto. A copy of that issue was sent to Dr. Pei's widow, and the following letter was received from her:

Montclair, NJ
April 16, 1978

Dear Mr. Harmon,

Thank you for your kind words about Mario.

He was so interested in a world language — I hope it will work out one day. Give my thanks to the Board of Directors and the Membership for their sympathy.

I will be glad to have the *Newsletter*. You know of his great interest in Esperanto; I think it was his choice of all the constructed languages.

Yours Sincerely,

/s/ Pearl G. Pei

NATIONAL ESPERANTO TEACHERS GROUP ACTIVE

The national organization of teachers of the international language Esperanto, *Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto* (AAIE), a branch of the International League of Esperantist Teachers, actively publicizes information on the international language from a standpoint of teaching and class organization, as well as conducting examinations at various levels.

AAIE publishes a quarterly bulletin under the editorship of Dorothy Holland of Santa Barbara, CA. The organizations' membership includes many outstanding teachers of the international language, and non-Esperantist supporters are welcome if they are professional educators, whether active or retired. Non-professionals engaged in teaching Esperanto are also welcomed as members.

The membership fee is \$5.00 per year. Application forms are available from the Secretary, Mrs. Mary Meyers, 253 E. Delaware Place #21B, Chicago, IL 60611.

The Spring issue of the *AAIE Bulletin* contains many excellent teaching hints and a graded assessment of teaching materials and texts for various levels. The *Bulletin* also provides a listing of courses currently being taught in the international language.

ESPERANTO AT THE NORTHEAST CONFERENCE ON TEACHING OF FOREIGN LANGUAGES

From April 13 through 16, 1978, Esperanto was brought to the attention of many foreign language teachers and supervisors from the East Coast in the name of the American Association of Teachers of Esperanto. Approximately 2,800 members of the teaching profession attended workshops and visited exhibits at this convention where, for the first time, Esperanto was presented.

Initially arranged by Dr. E. James Lieberman, the booth in the exhibition hall was stocked with samples of Esperanto literature as well as various informational folders provided by ELNA, Dr. Lieberman and Thomas H. Goodman. After Mr. Goodman had persuaded the directors of the Northeast Conference last year to include his proposed workshop on teaching Esperanto, Dr. Lieberman arranged to sponsor him and Dr. John L. Lewine (the vice-president and president of AATE, respectively) as voting members of the advisory council through funds from the Esperantic Studies Foundation. Further support came from Dr. Humphrey Tonkin through assistance from UEA and from the treasury of AATE for furniture rental.

The booth was open three days, while Mr. Goodman's workshop was scheduled for two days. Assisting Mr. Goodman were Dr. Lewine, Probal Dasgupta, Joseph F. Conroy, Maria and Ralph Gerson, Joan L. Dorey, Jose Vazquez and William C. Dickerman. The handouts at the booth attracted dozens of teachers of foreign languages to Mr. Goodman's presentation, and many became interested in including Esperanto in the school curriculum in some way.

The success of Esperanto at this conference marks a major breakthrough in acceptance of Esperanto by the academic establishment — something worth continued promotion when the Northeast Conference meets in Washington next year.

Described by one teacher as seeming to usher in an almost messianic era for language teachers, Esperanto is now being seriously considered by members of the profession from several states in the Eastern region of the United States. Perhaps it will not be many years before they are teaching Esperanto as regularly as Spanish, French, German or other languages.

Thomas H. Goodman

SUKCESEGA LETERVESPERO EN TAUNTON, MA

La letervespero de la Tauntona Esperanto-Klubo anoncita por la 21a de marto estis plene sukcesa. La klubo ricevis entute 62 leterojn aŭ kartojn el 25 diversaj landoj.

Vere plezuriga vespero ĝi estis por ĉiuj, speciale por la novuloj kiuj neniam revis pri tiel admirinda realaĵo; por ili vera revelacio.

La klubanoj estas nun ŝarĝitaj per la kolosa laboro respondadi al ĉiuj kaj reciproki la belegajn esperantaĵojn ricevitajn.

La klubo intencas nun aranĝi malgrandan ekspozicion en la Taunton Public Library en la proksima estonteco.

Paulo Soares De Sousa

PIKNIKO POR ESPERANTISTOJ EN MARYLAND

La Esperantistaro de Baltimore, MD invitis la membrojn de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, membroj, amikoj kaj gastoj kune, al pikniko je 4a junio en Marriotsville, apud Columbia, MD.

Imitinda ideo por kluboj kaj grupoj ĉie en Usono - la someraj monatoj povas esti gajigitaj per tiaj distraĵoj!

KLUBNOTOJ EL USONA ESPERANTUJO

•Chicago: La junia kunveno de la Esperanto-Societo de Chicago okazos la 25an junio ĉe la hejmo de Julie Regal, 30 Fourth St., Downers Grove, IL. Kafo, rakontetoj, poemoj estas promesitaj.

•Los Angeles: La maja kunveno de Esperanto-Asocio de Los Angeles enhavos tri prezentaĵojn; poezilegato fare de Bernice Garrett, originala rakonto de Paul Taylor, kaj teatraĵeto reĝisorata de Donna Stitz.

RECENZO

Satiroj: La Aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-a kaj Levu la Manojn! (en unu volumo) - F.V. Dorno, 2a eld., Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1977. 140p. kartonbindita. ISBN 963 571 009 7 (havebla ĉe ELNA Libroservo - \$5.25)

Ĉi tiu "dua eldono" estas kunigita represo de du antaŭaj eldonoj jam delonge elĉerpitaj. La reapero de tiel spritaj verkoj ebligas, ke novaj Esperantistoj povos ĝui bonstilan kaj interesplenan verkon kiu jam ĝojigis malnovajn Esperantistojn dum multaj jaroj.

Stultulof la X-a estas la reĝo de la lando Fuŝio. La satira priskribo de la malfaroj, misfaroj kaj fuŝfaroj de tiu reĝo kaj ties lakeoj estas plenplena je humuro, kvankam ofte ironia kaj ĉiam akre satira. Sed Dorno samtempe prezentas la reĝon en foje alia lumo; kiel preskaŭ homecan viron. Ne estas ia profunda moralo aŭ penso en ĉi tiu frandaĵo, escepte ke absoluta povo ridigas, almenaŭ en libroj.


Levu la Manojn estas teatraĵo bone konata al leginto de *Literatura Mondo*; siatempe ĝi estis prezentita en multaj diversaj lokoj fare de amatoraj Esperantistaj geaktoroj. Ankoraŭ hodiaŭ ĝi estas sprita teatraĵo. Inter la ĉefroluloj estas iu "Bil Svarc" sed ne estas klare, ĉu nia samnoma membro iel rilatas al tio.

Oni rajtas gratuli al la redaktoro, Vilmos Benczik, pro la aperigo de ĉi tiu valora kombinaĵo, spite al preseraroj kiuj mezabundas; estas interese, ke kelkloke la sama eraro estas farita pri la sama radikoj, "kalv" — kiun la kompostisto insistis ŝanĝi al "klav".

Oni ankaŭ rajtas esperi, ke la eldonisto, Tibor Vaskó, povos trovi alian persiston kaj iel aranĝi pliviglan kontrolon de la presitaj libroj. Sur kelkaj paĝoj la inko estas tiel manka, ke oni apenaŭ povas legi la literojn, kaj sur aliaj paĝoj aperas grandaj makuloj. La kovrilo indikas, ke iu ne atendis la sekigon de la inko antaŭ ol kunmeti la kovrilon kun la librigitajn paĝojn. Por la vendoprezento de tiu ĉi libro, oni rajtus anticipi profesian laboron, kaj espereble la eldonejo trovos rimedojn por plialtigi la nivelon de siaj libroj.

Tamen kun makuloj, eraroj kaj redaktora malatento, tiuj kiuj ŝatas bonan literaturon devus aĉeti ĉi tiun libron.

La Fantoma Recenzisto



ESPERANTO KONIGATA AL INSTRUISTOJ

ELNA-membroj Allan C. Boschen kaj John Lewine faris prezentadon pri Esperanto al la geinstruistoj de fremdaj lingvoj kaj de la angla lingvo en Lexington High School, Pittsfield, Massachusetts lastan monaton.

Ĉeestis proks. 40 geinstruistoj, kiuj aŭskultis 2½-horan prezentadon.

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

DUM LA SPECIALA VARB-KAMPANJO!

Ĝis la 28a de februaro, 1978, ĉiu nova aŭ renoviga abonanto ricevos senpage grandformatan kalendaron por la jaro 1978, kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj.

Abonprezoj:

por 1 jaro	\$3.00
por 2 jaroj	\$4.50
por 3 jaroj	\$6.00

KLUBOJ! Varbu amase abonojn aŭ reabonojn al *El Popola Ĉinio* inter viaj klubanoj, kaj rekompense ricevu el Ĉinio memoraĵon kun ĉina stilo!

Sendu abonojn al la loka peranto:

ELNA Centra Oficejo
Box 1129
El Cerrito, CA 94530

Generala Distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno kaj Abonvarbilo Senpage Akirebla Laŭpete

NEKROLOGO — ETHEL CLYDE

S-ino Ethel Clyde, Dumviva Membro de ELNA, mortis en Novjorko je 13a aprilo, 1978. Eble la plej aĝa membro de la Ligo je la ago de 98, S-ino Clyde estis grava subtenanto de diversaj projektoj por Esperanto. Unu el la ĉefaj estis la financa subteno de la "publikiga fonduso" per kiu 10,000 ekzempleroj de la broŝuro de D-ro Mario Pei, *Wanted: A World Language* estis aĉetitaj de la Ligo kaj disdonitaj vaste en Usono.

S-ino Clyde ankaŭ finance helpis la dissendadon de tiu broŝuro al ĉiuj urbaj kaj universitataj bibliotekoj en Usono.

Dumviva membro ekde 1972, ŝia intereso en Esperanto estis instigita de mortinta Esperantisto Donald Stevens de Arden, Delaware. Stevens mem estis agema en Esperantaj aferoj ekde 1912, kiam li kun la patro ludis rolojn en la Esperantigita teatraĵo "Mezsomernokta Sonĝo."

Al la postrestanta familio de S-ino Clyde ELNA esprimas elkorajn kondolencojn.

POR FILATELISTOJ

Speciala kaj tre alloga koverto kun portreto de D-ro Zamenhof estis eldonita por filatelistoj fare de *The Philatelic Journalist*, Box 150, Clinton Corners, NJ 12514. Dua koverto estis ankaŭ eldonita de ili por festi la Semajnon de Internacia Amikeco.

La kosto por unu koverto estas \$1.00, aŭ 3 por \$2.75, plus afrankita revenadresita koverto. Se vi havas amikojn kiuj kolektas filatelajn kovertojn, nepre aĉetu la du kaj faru bonan donacon!

USONA ANTOLOGIO KOMPILOTA

Celante verki kaj eldoni esp-an antologion de Usonaj poemoj, komitato nun formiĝas. Laŭ Vilhelmo Oldo, kiam la Britoj komencis la unuan laboron pri la Angla Antologio, ili demandis sin al kiuj legantoj ili celas, kaj la respondo estis: al tiuj, kiuj ne povas legi la poemojn en la originala formo.

Simile, ĉe ni, la tasko estas: vidigi la evoluon de poezio Usona.

Tiucele Jim Cool kaj Marta Evans eklaboras por elekti poetojn kaj poemojn kiuj taŭgas. La listo jam superfluas. Ili bezonas helpon pri la elektado.

Eĉ pli grave — kiu volas/povas traduki la elektotajn poemojn en Esperanton? Kie estas *La Usona Skolo*? Ĉu vi?

La komitato devas konsisti el elektantoj, tradukantoj, kritikistoj, legantoj, helpantoj, ĉiuspecaj. Bonvolu sendi viajn nomojn al: Marta Evans, p/a ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

A UNIVERSAL SUBSCRIPTION SERVICE

FOR THE
UNIVERSAL LANGUAGE

All Esperanto periodicals can be ordered from a single source. Send a stamped, self-addressed envelope to:

R. Kent Jones
Esperanto Language Service Co.
452 Aldine, Apt. 501
Chicago IL 60657

KOREKTIGO KAJ AVERTO - PRI LA LIBANA PETO

En la jan-feb numero de *Newsletter* (pago E-2) aperis artikolo raportante informon pri la forbruliĝo de la oficejo de la Libana Esperanto-Instituto. De UEA venas la jena informo:

Pri "Libana Esperanto-Instituto" ni antaŭe neniam aŭdis. "Libana Esperanto-Asocio" aperas en la *Jarlibro* jam de multaj jaroj, sed laŭ nia impresado ĝi ekzistas nur en la *Jarlibro*. Prof. Chanem estas membro el Fondaĵo Canuto, do senpage, jam de multaj jaroj, almenaŭ 15, sed laŭ nia scio neniam estis aktiva. Li neniam skribas al UEA aŭ ion raportas pri Esperanto-agado. Do estas tre mirinde por ni, ke "...la centra oficejo de esperanto en nia lando...estas detruita kaj bruligita kune kun ĉiuj dokumentoj, libroj, mebloj, skribmaŝinoj kaj modernaj ekipaĵoj". Estas mirinde, ke ke kun tiom da dokumentoj kaj ekipaĵoj, tiu oficejo sukcesis resti dum tiom da jaroj tiel komplete silenta."

En la estonteco, *Newsletter* provos kontroli la pravecon de informo el eksterlande antaŭ ol presigi ĝin.

VOLAS KORESPONDI

•31-jara Orientgermana Esperantisto volas kor. pri sporto, politiko. Kol. BK. Hans-Joachim Krieg, 49-ZEITZ, DDR, Kloster-str. 11.

•Juna Hungara Esp-isto sercas kor. kun 16-jara knabo au 14-jara knabino. Tarczal Ildiko, 2400 Dunaujvaros, Gabor A. 5 1/2, Hungario.

•16-jara nova membro de ELNA volas praktiki Esp-on per kor. Kirk Spiegel, 23833 Bessemer St., Woodland Hills, CA 91367.

•19-jara Bulgarino sercas Usonajn plumamikojn. Galja Markova, 7800 Popovo, "Aurora" N. 31A, Bulgario.

•Juna Hungara Esp-isto volas kor. pri diversaj temoj. Laslo Keller, Str. Kulso-pelyhespart No.44, 5100 Jaszbereny, Hungario.

SPECIALA INFORMO AL PARTOPRENONTOJ EN LA UK EN VARNA

Laŭ informo ricevita de S-ro Aleksiev, la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato por la UK en Varna, enirvizo por Bulgario estas ricevebla en la Bulgara Ambasadejo per prezento de la konfirmilo (poŝtkarto de UEA kun kongresnumero). Speciala invitletero de la LKK ne estas bezonata. Vizo ja estas necese por eniri Bulgarion el Usono.

SUBSCRIBERS TO LITERATURA FOIRO PLEASE NOTE

Effective immediately, the annual subscription rate for *Literatura Foiro* in the United States is \$6.00.

Subscriptions may be paid through ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

Christmas in the Land of the Pharaohs!
A most unusual 14-17 day tour of
Egypt. Depart from San Francisco or
New York. For free folder, information
write: *Horizons Unlimited*, 928-A Sir
Francis Drake Blvd., Kentfield, CA
94904. Better hurry — this will go fast!

LOCAL ESPERANTO SOCIETIES

Esperanto c/o A.C. Boschen
195 Partridge Road
Pittsfield, MA 01201

Esperanto c/o G. Cirrincione
203 Orchard St.
Boston, MA 02172

Esperanto c/o S. Kittredge
59 Dalewood Road
Newington, CT 06111

Esperanto Study Group
c/o Frances Leshner
119 — 9th Ave.
New York, NY 10011

Esperanto Society of New York
54 West 94th St. #2-F
New York, NY 10025

Esperanto c/o Karl Nell
388 Dorchester Road
Rochester, NY 14610

Esperanto Societo of Philadelphia
c/o J. Conroy
1844 Arthur Street
Philadelphia, PA 19152

Esperanto SOCIETY OF Washington, DC
2947 Tilden Street NW
Washington, DC 20008

Baltimore Esperanto Club
3218 Shelburne Road
Baltimore, MD 21208

Esperanto Society of So. Florida
PO Box 16224
Temple Terrace, FL 33687

Esperanto Club of Central Ohio
1144 Kingsdale Terrace
Columbus, OH 43221

Esperanto Society of Indiana
18 E. Second St.
Peru, IN 46970

Eastern Iowa Esperanto Society
3110 Alpine Court
Iowa City, IA 52240

Esperanto Society of Wisconsin
1958 N. 38th St.
Milwaukee, WI 53208

Esperanto Society of Chicago
P.O. Box 11958
Chicago, IL 60611

Esperanto Society of Ft. Worth
E.L.A., Box 17627
Ft. Worth, TX 76102

San Antonio (Von Nimitz) Club
111 Siesta Lane
San Antonio, TX 78201

Colorado Esperanto Center
489 Toledo St.
Aurora, CO 80011

Esperanto Assoc. of Los Angeles
430 S. Peck Drive
Beverly Hills, CA 90212

Esperanto in San Diego
3470 Juniper St.
San Diego, CA 92104

Esperanto c/o J.P. Stitz
329 Sonora St.
Redlands, CA 92373

Esperanto-Rondeto de Santa Barbara
1010 Crestwood Place
Santa Barbara, CA 93105

Esperanto c/o D-ro Balcar
62 Via Castanada
Monterey, CA 93940

SFERO (San Francisco)
Esperanto Regiona Organizo)
410 Darrell Road
Hillsborough, CA 94010

Berkeley Esperanto Association
1350-A Rose St.
Berkeley, CA 94702

Mill Valley Esperanto Circle
60 Hillside Avenue
Mill Valley, CA 94941

Esperanto Society of Sacramento
2450 - 28th Ave.
Sacramento, CA 95822

Esperanto Society of Portland
6644 SE 82nd Ave.
Portland, OR 97266

Seattle Esperanto Society
5210 Greenwood Ave. N.
Seattle, WA 98103

Esperanto c/o M. Hammersmith
3514 Holiday Drive
Olympia, WA 98501

Esperanto c/o K. Ver Ploeg
321 E. 19th Ave.
Spokane, WA 99203

Walla Walla Esperanto Society
1351 Grant Street
Walla Walla, WA 99362

Esperanto Society of Alaska
PO Box 302
Douglas, AK 99824

CONTRIBUTORS TO ELNA IN 1978 (as of May 25th)

[Note: names are given in random order]

William P. Simpson
Douglas B. Swett
Eugene H. Thompson, Jr.
Eastern Iowa Esperanto Society
Robert A. Swenson
Cornelius J. McKown
R. I. Longley, Jr.
F. J. Belinfantre
Marguerite Hughes
Ella H. Gibson
Ralph S. Walker
Cecelia Peterson
Robert L. Wills
Gary Lackowski
George Lockhart
Werner Simon
Rose Norlund
John Sparks
Curt E. McIntosh
Allan C. Boschen
Jaqueline Reynolds
Ges-roj J.W.T. Schisler
Angel Segura Peralta
James Parkerson
William M. Deary
Mark C. Rainey

Foster Parmalee
Joe Eisele
Roan Orloff Stone
Richard S. Mull
D-ro Stefan Chobanoff
Margo Smith
Phillip Driscoll
Emma M. Jungton
Scott Shannon
Harold Oatley
Erna Harris
Audrey Janisen
Gertrude Novak, MD
Lee & Gigi Edwards
Constance Virtue
Doris Vallon-Wheeler
B. J. Balcar
F. H. Sumner
Forrest J. Ackerman
Alberta Casey
Madeleine d'Estries
Washington Kongreso
Sara Ann Estling
Sandor G. Burstein, MD
Ges-roj Wm. Schulze
George Rodenborn

Marion E. Bigelow
Germaine Chomette
William D. O'Ryan
Tom Goodman
Philip D. Anderson
Esperanto Club of Colorado
Wm. R. Harmon
Sergio Docal
Ellen A. Lewis
Mary E. Meyers
Paul J. Burke

Horace B. Hand
Walter A. Donner
Esperanto-Klubo de Napa
Charles E. Koomans
Clyde G. Dewey
W. Campbell Nelson
Mary R. Winston
Donald R. Jones
William J. Ford
Harry Bochner
Florence R. Mack

ELNA's heartfelt thanks to these generous supporters. No special appeals have been made recently for donations; but free-will donations such as given by those listed above remain an important part of ELNA's financial picture. Without them your League could not provide the services that it does. Thanks to all!!

LA SEKSO KAJ LA PSIKO: SUK-ERO 1978

Kiel distingi edukadon de psikoterapio? Tro facila respondo estus, ke unu plenigas psikujon kaj la dua kirlas la miksaĵon de scio kaj sperto je malpli dolora ekvilibro. Alia simplaĉo estas, ke unu traktas la cerbon, alia la koron (aŭ intelekton kaj senton, aŭ racion kaj emocijon); nu, kio pri la spleno? Kompreneble, tiaj vandoj ne ekzistas en vivo. Sciencocele ni foje faras digon anstataŭ vojon per niaj vorto-brikoj.

La seksedukado aparte mokas vandojn. Duonŝerce sed ankaŭ prave oni diras, ke la seksorganoj troviĝas ne interkrure, sed inter la oreloj! La konataj seksterapiistoj Masters kaj Johnson informas, ke proksimume duono el siaj klientoj havis problemon de nescio. Tamen, multaj aliaj klientoj estas, ekzemple, kuracistoj, plenaj je preciza scio, kies emocia evoluo aŭ amplekso malperfektas.

Oni ĝuas, suferas, travivas sed ne povas majstri sian sekssperton. Anksio kaj vundebleco apartenas al am-intimo, kaj ekvilibro ne egalas trankviliĝo. Oni ne kaptas kaj tenas mens-sanecon; oni kulturata tion tra ŝanĝado, ŝatata kaj veiga, ĝis vivofino. Nek lernado nek seksosento ĉesas dum longa, kompleksa vivovojo.

La koncerna kurso (SUK, Psikologio: "Seksedukado kaj Psikoterapio: Integriĝo je Mensa Sanigo;" 1978.08.20-27) rigardos birdperspektive la malplatan terenon. Inkludajoj: La sekso en socio; de pia tero al terapio; Psikanalizo, komprenado kaj helpado; La nekoscio, la volo, kaj persona respondeco; La familia, (geedza) para, kaj grupa terapioj. Krom lekcionoj kaj kolokvojoj pli-malpli formalaj, okazos ĉiutaga neformala grup-esplorado pri kaj en koncernaj temoj.

La lekciisto, D-ro E. James Lieberman, estas psikiatro kaj aŭtoro (*Sex and Birth Control: A Guide for the Young*; t.e. *Sekso kaj Nasklimigo: Gvidilo por la Gejunuloj*). Antaŭa prezidanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, li Esperantistiĝis en 1954. Krom speciale preparita teksto, legindaj por kursanoj estas *Psikanalizo kaj Edukado* de Pierre Bovet (1925), *Fundamentoj de Psikologio* de C.J. Adcock (SUK, 1976), kaj *Socio-psikologio kaj Grupo-dinamiko de la Esperanto-movado* de Tazio Carlevaro (1977).

Astronomio, Psikologio, kaj Internacia Literaturo estas la tri sekcioj de SUK 1978, 6a-27a aŭgusto, ĉe la Universitato de Lieĝo. Oni povas partopreni 1-3 semajnojn, kaj povas elekti du sekciojn samsemajne se unu estas Literaturo. Perfektigan Esperanto-kurson gvidos J.P. Vilhelm.

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon de: SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ, Boite Postale 9, B-4000 Liege X, Belgio.

PRELEGO DE TONKIN ĈE U.N.

De Marion Lorie, ELNA-komitato pri U.N. Aferoj, venas informo pri letero de Guido Bertucci, Sekretario de la Esperanto-Klubo de UN al David Jagerman, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Novjorko, kiu tekstas jene:

"La 4an de aprilo prof. Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, faris en Unuiĝintaj Nacioj prelegon kun la titolo 'Lingvo kaj la internacia komunikado: la rajto je komunikado'. Ambasadoro Ralph Harry, Ĉefo de la Australia Delegacio al Unuiĝintaj Nacioj, faris trafe prezentan antaŭparoladon kaj ankaŭ kunhelpis dum la respondado al demandoj. Ĉeestis proksimume tridek kvin personoj, kaj okazis stimula diskutado post la prelego. Generale, la aranĝo montriĝis granda sukceso.

"La Esperanto-Klubo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu aranĝis ĉi tiun eventon, nun intencas multoblige la tekston de la prelego de prof. Tonkin kaj disdoni ekzemplerojn interalie ankaŭ por la uzo fare de interesitaj anoj de la Novjorka Esperanto-Societo. En la nomo de la Esperanto-Klubo de Unuiĝintaj Nacioj, mi profitas ĉi tiun okazon por danki vin kaj ĝenerale la membrojn de la Novjorka Esperanto-Societo pro la financa helpo, kiun vi tiel malavare decidis doni al nia klopodo."

Informo pri eventuala presigo de la koncerna prelego por ĝenerala haveblo aperos en estonta numero de Newsletter.



ESPERANTO-KLASO EN HOOSAC VALLEY HIGH SCHOOL

La supra bildo montras kelkajn studentojn en la Esperanto-klaso instruata de Allan C. Boschen en Hoosac Valley High School, Massachusetts. De maldekstre: Boschen, Jon Johnson, Robert "Bobcoj" Wilson, Gincjo Gavazi, prezidanto de la Esperantoklubo de Hoosac Valley HS, kaj je dekstra flanko, Bruce "Fortulo" Poulton, vicprezidanto de la klubo.

RECENZO

Optimala Ortografio de la internacia lingvo Esperanto. Albert Lienhardt. Eldonita de la aŭtoro. \$4.00. Mendebila de ELNA Libroservo.

Ĉi tiu verko pretendas esti la plej nova en longa serio (ekde almenaŭ 1902) de projektoj por liberigi Esperanton de ĝiaj malkonvenaj supersignoj, kiuj malfaciligas presadon, tajpadon, telegrafion, kaj maŝinan pritrakton (ekz-e komputoran). Efektive, tamen, ĝi estas reform-projekto celanta igi E-on pli presebla ktp., sed ankaŭ pli "natureca" kaj alloga por eblaj uzantoj. Tiu belsona celo motivis ankaŭ la proponantojn de Ido kaj Interlingua, inter aliaj. Pro klare eksplikitaj kialoj, la aŭtoro proponas reformi ne nur la skribon de la lingvo, sed krome, parte, ĝiajn prononcon kaj vort-trezoron.

Pri presado kaj skrib-reformoj parolu D-ro Zamenhof:

• "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi **ch, gh, hh, jh, sh, u.**" [*Fundamenta Gramatiko, Sek. A*]

• "Se vi volas skribi per 'h' anstataŭ supersignoj, vi povas tion fari ... sed ... se vi volas uzi **sisteme** la tute novajn literojn 'y' kaj 'w', anstataŭ 'ĵ' kaj 'ŭ', [mi ne parolas pri **specialaj** teknikaj okazoj, kiam tio eble estos necesa] vi devas — se vi deziras esti lojala esperantisto kaj ne konduki anarĥion en nian aferon — akiri por tio la permeson de la 'Lingva Komitato'."

(*Lingvaj Respondoj*, N-ro 60) [*La funkcioj de la Lingva Komitato transpasis al la Akademio de Esperanto.*]

Rebati ĉiajn proponojn de Lienhardt okupus tro da spaco ĉi tie. Mi diros nur jenon: Por simpligi la lingvon li malsimpligas ĝin, por plifaciligi ĝin li malfaciligas ĝin, kaj por internaciigi ĝin li latinigas ĝin. Mi konsentas, ke ia klara skribo sen supersignoj estus plurkiale preferinda ol la nuna (kaj la aŭtoro citas Zamenhof 1904 en verŝajne sama sento, p. 11); sed ĝis la Akademio aŭ la Esperantistaro ĝenerale aprobas tian lingvoŝanĝon, ĝi ne estos permesebla.

Recenzis: Mark Mandel

A RABBI'S MESSAGE

[Ed.Note: The following article appeared first in the Temple B'rith Kodesh Bulletin of Rochester, NY, and was reprinted in the local newspaper, Democrat & Chronicle of Rochester, NY February 10, 1978.]

I was interested in reading a letter in the Democrat & Chronicle, recommending the use of Esperanto as an international language. The letter suggested that President Carter would not have had the difficulty he had with an inadequate interpreter in Warsaw had they all used Esperanto as their language of diplomatic discourse. The letter writer also described the origins of this unique language that was devised by Dr. Zamenhof.

By coincidence my late father knew Dr. Zamenhof in Warsaw. In fact, Dr. Zamenhof, who was by profession an ophthalmologist, fitted my father with his first pair of eyeglasses. They continued to remain fast friends. My father had recently left the Yeshivah (a rabbinical seminary) and came to Warsaw as an idealistic, young socialist and pacifist. The older Dr. Zamenhof had a vision of building a world united in peace and decency. To aid in human understanding, he devised this simple language from basic linguistic forms found in most modern (western) languages. Hence, it should be simple, he thought, for everyone in the world to learn it as a second language. He called it Esperanto, meaning "hope". It was a noble ideal. But with the First World War my father came to America and the friends never saw each other again. But my father spoke often and fondly of his old friend, Dr. Ludovic Lazarus Zamenhof, who had devised the language of the future; the language of a world united in peace and understanding.

After my father's death I heard nothing more about Esperanto until I was serving as chaplain to the First Infantry Division at Fort Riley, Kansas. At that military installation was the headquarters of an unusual military unit called the "Aggressor Center." When there are military maneuvers and war games, the "Aggressor Center" prepares the opposing troops who serve as "the enemy." They use different uniforms and insignia. They also use a different language: it is Esperanto. What a terrible irony.

Rabbi Judea B. Miller

WANTED: CHILDREN'S DRAWINGS AND PHOTOS

ILEI (International League of Esperanto Teachers) is organizing a world exhibition of children's art to take place during the Spring of 1979 in the UNESCO building in Paris, and possibly later at the Pompidou Center.

This exhibition is a contribution by the children of the world to the Anti-Racism Decade and UNESCO's International Children's Year. The main theme is: "It is not races but we who live in the world."

Specific themes will be:

1. Children's faces from the whole world.
2. Children playing and busy.
3. Children learning.
4. Children eating.
5. Children hungry.
6. Children and their home life.
7. How children see adults.
8. What children most desire.
9. Children putting on plays.
10. How children celebrate.

Procedure: Photos and pictures may both be used. The largest format should be DIN 3, the smallest DIN 4 (ask your photo shop or stationer if you don't know those sizes). Material should be sent by January 1, 1979 to: Prof. James Fairbank, 6 Avenue Rousseau, F-75016 Paris, France. Prof. Fairbank is ILEI's permanent representative to UNESCO.

After the Paris exhibition, the material will be available for several exhibitions throughout the world. All captions under the material should be bilingual, i.e., in the national language and Esperanto.

Every child who contributes drawings or photos will receive a postcard of the exhibition.

"NO, VIRGINIA..."

Americans Face Language Barrier

According to the Washington Post, over 250 Puerto Ricans were stranded at Dulles International Airport early this year by a snowstorm which diverted their New York-bound plane. The group found themselves in an airport with signs and assistance only available in English.

"We do have one employee who speaks Spanish, but she couldn't get to work," said the airport manager. It was necessary to get the group into buses to take them to hotels, all done primarily by sign language with much confusion.

A study is under way on the possibility of making Dulles' signs multilingual, but as an American Airlines supervisor explained, "We're a domestic carrier; we're not required to have signs in other languages." Retorted one of the harrassed Puerto Ricans, "Why not? Aren't we Americans, too?"

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA BOX 1129, El Cerrito CA 94530

Enclosed is \$ _____ for new renewal membership in ELNA for the year 1978.

NAME _____

Name and address of each new member published in ELNA Newsletter and next edition of ELNA-Adresaro unless member indicates otherwise.

ADDRESS _____

CITY _____ STATE _____ ZIP _____

Check correct category: Regular (\$15) Family (\$22.50) Youth (18 or under) (\$7.50)
 Student (full-time, 25 or under) (\$7.50) Senior (renewal only, 65 or over) (\$7.50)
 Life (\$300)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student or Senior rate) _____

OPTIONAL INFORMATION

Telephone number: Area code (_____) _____

OK to publish phone and/or call letters in ELNA-Adresaro?

Radio call letters (if applicable): _____

Yes No

SPRING HOUSE-CLEANING AT ELNA CENTRAL OFFICE BRINGS BARGAINS FOR ALL

ELNA member Marta Evans of Boulder, CO has spent several weeks working at the ELNA Central Office as a volunteer. Not only has she brightened up the place considerably, but she has cleaned out all the nooks and crannies, finding a number of treasures in old books — some quite rare — and a lot of materials useful for classes and clubs. Some of these are being offered to ELNA members as individual copies (Group A) and others have been grouped into various classifications for convenience.

The bargains on the lists below will be sold on a strictly first-come, first-served basis. The "bargain sale" will last only until June 30, 1978. All books and materials are used and are in legible condition, although some covers may be defective or stained. The condition of the individual books is shown below; the condition of the grouped materials is generally "fair." No refunds, no exchanges.

Group A - Individual Books [specify "bargain" when ordering]

<i>Antaŭ du mil jaroj</i> Xavier paper fair 400p	\$2.50
<i>Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj</i> Neergaard fair 235p	3.10
<i>La blankĉevala rajdanto</i> T. Storm fair 158p	2.00
<i>Doktor Esperanto</i> Ziolkowska good 330p	2.00
<i>"Edinburĝ"</i> vortaro 1967 ed. fair 288p	2.25
<i>Elektitaj paroladoj k prelegoj</i> Lapenna fair 150p	2.00
<i>El litova poezio</i> 1938 paper fair uncut 195p	.85
<i>Esp-Eng Dictionary</i> Butler 1967 fair 450p	2.50
<i>Essential Esperanto</i> Gething 1959 poor 128p	.65
<i>La evangelio laŭ spiritismo</i> Kardec 1948 fair 420p	1.00
<i>Fabiola</i> Wiseman 1928 good 436p	2.50
<i>Fabiola</i> Wiseman 1928 paper fair 436p	2.00
<i>La Faraono</i> Kabe vol.3 1907 paper poor 198p	1.00
<i>Hindo rigardas svedlandon</i> Sinha paper good 200p	1.00
<i>Internacia frazaro</i> Kenngott 1929 paper fair 51p	.35
<i>Joĉjo Holm kaj liaj amikoj</i> [sic] vandeHulst good 236p	2.50
<i>Kataluna antologio</i> 1931 fair 400p	3.00
<i>Memorlibro pri la Zamenhof-jaro</i> fair 120p	4.00
<i>Plena vortaro & supp.</i> 1964 fair 574p	4.00
<i>Pro Ĵstar</i> Luyken 1924 fair 300p	1.50
<i>Originala verkaro</i> Zamenhof 1929 med. 600p	10.00
<i>Plena Ilustrita Vortaro</i> 1970 good (cover stain) 1300p	19.50
<i>Rakontoj el pluraĵ landoj</i> Parker 1972 paper good 89p	.50
<i>Saltego trans jarmiloj</i> Forge 1924 fair 192p	1.00
<i>La Sankta Biblio</i> (kompleta) 1954 good 225p	4.00
<i>Secondary School E-o I</i> Markarian/Sullivan good 143p	1.60

<i>Soleĝo Catala</i> 1967 paper good 290p	5.00
<i>Step by Step</i> Butler 1965 fair 280p	2.25
<i>La Sunkrono</i> Koenen 1937 paper fair 160p	.75
<i>La Ŝtelita Lampo</i> Winkler 1960 fair 16p (infanlibro)	.75
<i>Tiaj ni estas</i> Bako 1965 paper fair 252p	1.85
<i>La tragedio de reĝo Lear</i> 1924 paper fair 170p	1.00
<i>Vivo vokas</i> Engholm 1946 fair 180p	1.50
<i>Vojaĝo al kazohinio</i> Szathmari 1958 fair 314p	1.75

Group B - Packages of old books and pamphlets as described:

Type of Material	Price Each
Young people's stories	1.75
About Esperanto	3.50
Ten old Esp-o texts, all different	5.00
Stories and Readers	2.50
Miscellaneous social science & travel	2.50
Poems, assorted	2.50
Misc. Arts & Science	2.50
Religions, assorted	2.50
Pre-1930 novels, readers	2.50

(When ordering, specify "type of material" listed.)

Group C - "Grab-Bag" Packets which may [or may not] contain interesting old travel folders, magazines, song sheets, teaching aids, or almost anything in or about Esperanto that still has some value. **HOW TO ORDER:** Make a contribution of at least \$5.00 to ELNA and with your check specify "Send Grab-Bag Packet." One per member only, until they vanish. Nine of these packets will include two copies of the play "Proksima Nekonato" by Scibor-Rylski.

WHY NOT TAKE ADVANTAGE OF MARTA'S SPRING CLEANING AT THE CO? IT MAY NEVER HAPPEN AGAIN!

NOVAJ LIBROJ EN LA LIBROSERVO

<i>Cent Ĉojkantoj</i> - Boulton (poetry) 46p bros. (reprint)	2.95
<i>La Kaŝita Vivo de Zamenhof</i> - Maimon 214p bound	13.75
<i>En Maskobalo</i> - Baghy (1-act plays) 141p bros. (reprint)	5.25
<i>Satiroj - Aventuroj de Stultulo kaj Levu la Manojn</i> - Dorno - Dorno 140p bros. (2nd Ed.)	5.25
<i>Je la Flanko de la Profeto</i> - Chiussi 362p bros.	15.50
<i>La Granda Kaldrono</i> - Francis 592p bros. (original work)	21.00
<i>Esperanto-English Dictionary</i> - Butler 450p paperback	3.95

NOTE: The price of the Wells Teach Yourself Dictionary has been reduced from \$3.95 to \$3.50 due to a favorable purchase.

Esperanto League for North America

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA



Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Berkeley, CA
Permit No. 330

NEWS - PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed